

Leterkesto, 7.

Konkludo al nia leterkesto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.05.09 & 11

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ ni konkludas nian babiladon kun skribintaj geaŭdantoj, esperante, ke dum la pasintaj semajnoj kaj la nuna ĉiuj povis aŭdi niajn dankojn kaj salutojn.

A.- Saluton al Jean-Pierre VANDENDAELE en Lissewege, Belgio, al Joop VAN DER HOEVEN en Lopik-Cabauw, Nederlando, al Pisarcuk VASILIJ en Kamenec-Podolsko, Ukrainio, kiu skribis:

Cl.- "Mi senlime dankas vin pro viaj radioelsendoj. Viaj esperanto-radio-elsendoj estas piej aŭskultejblaj en nia urbo. Bedaŭrinde ili estas mallongaj kaj ne ĉiutagaj."

A.- Saluton al Kiril VELKOV en Vraca, Bulgario, al Giuseppe VENTURINI en Mogliano Venero, Italio, kiu sendis 6 mesaĝojn aŭdraportajn kaj petis niajn fotojn. Li skribis:

Cl.- "De longe mi konas viajn voĉojn, tiel mi povos ekkoni ankaŭ viajn vizaĝojn".

A.- Joachimo VERDENO en Singapuro skribis:

Cl.- "Hodiaŭ mi aŭskultis vin, surprize bona aŭdebleco, tio okazas ne ofte. Ankaŭ en Tajvano, antaŭ unu monato mi aŭdis sed la aŭdebleco estis ne tre bona... Do dankon pro tiuj direktataj dissendoj.

A.- Saluton al Vieira WANDERLEY en Rio de Janeiro, Brazilo, al WANG Tianyi en Xi'an, Ĉinio, kiu skribis:

Cl.- "Ĝus mi aŭdis viajn belsonojn finfine kaptinte Svisan Radion Internacian. Ho. Mi sentas min feliĉa tiel kiel mi esperis, ĉar via radio estas tre forta kiel Radio Pekino por sia regiono Malproksima Oriento. Antaŭe mi ĉiam dubis, ke la ĉinoj povus kapti vian radion, kaj ĝustadirite Eŭropo estas tiel malproksima por la ĉinoj. Jen nia mondo fariĝas malgranda pere de via radio. Via prononco estas tre klara, kaj rapideco estas taŭga por la aŭskultanto... Fine la muzika melodio pleniĝas de la eŭropa gusto. Entute, mi sentas min kontenta je ĉio, kion vi ĉiuj faris. Nun ĉe mi jam estas nokto. La horo atingis la 22-an laŭ Pekina tempo!"

A.- Hugo WESTHOFF en Waltrop, Germanio, sendis rememorigan novjaran salutraporton, kies eron ni legas al vi. Ĝi rememorigas, ke antaŭ 45 jaroj multaj homoj rehejmiĝis kontentaj pri la ekfino de la milito.

Cl.- "En junio 1945, post la dua mondmilito, dum fervoja transporto el Aŭstrio hejmen al Germamo, antaŭ nia propra malsoldatiĝo ni venis ankaŭ al Passau. Tie ni havis pli longan haltodaŭron ĉe la manovra stacio. Ni eltrajniĝis kaj kelkaj homoj komencis pretigi varman manĝon sur fajro inter la trakoj, sed subite io eksplodis. Sur la najbara trako vagono de municia vagonaro, restaĵo de la milito, ekbrulis. Oni komencis febran agadon formantvri la munician vagonaron, do ankaŭ nia trajno estis dividita, ĉar la lokomotivo ne povis tiri la tutan trajnon, kaj ĝi forvaporis kun la unua parto de la trajno eĉ kun mia pakaĵo, tio estas tornistro kun terpomoj. Kion fari? Kun kamarado mi iris al la proksima fervoja ponto sur Danubo...

Sed mia kamarado ne povis transpaŝi la ponton vidante tra la interspacon de la diloj malsupre en la profundo Danubon. Tial ni decidis suprensalti sur la unuan venontan trajnon ĉe la ponto, kie la relvojo lom pli supreniĝis. Jen post mallonga tempo alproksimiĝis trajno, sed la vagonoj eĉ ankaŭ la vagonŝtupoj estis plenaj de soldatoj nederlandaj, belgaj aŭ francaj. Unu el ili trumpetis la melodion: "Estas longa vojo al Tipperary". Kvankam ni ĝojis pri la konata melodio, ni malĝojis pensante pri la longa vojo al nia hejmlando. Vidinte, ke ni ne havus ŝancon por suprensalti - estis ankoraŭ skribite nederlande sur unu vagono: "Finita estas la laboro por germanoj" - restis al ni nur reiri al la stacio. Feliĉe baldaŭ ni povis pluveturi per la dua parto de nia trajno al Regensburg, kie mi ankaŭ retrovis mian tornistrinon. La 6-an de junio 1945 mi venis hejmen. Memorante tiujn travivaĵojn mi volus diri: Hodiaŭ en 1991 la spiritaj bariloj, tio estas ankaŭ la lingvaj, jam tre multe estas disŝiritaj, sed mi esperas, ke eĉ ankaŭ la lignaj aŭ feraj bariloj pli kaj pli foriĝos, kaj eble ni revidos unu la aliajn iutage en unuigita Eŭropo!"

A.-Saluton al Lars WESTMAN en Skövde, Svedio, kiu dankis dirante:

CL.- "Pro via persista laboro havigi aŭskultindajn programojn mi kore dankas",

CL.- Johannes WINDISCH en Tübingen, Germanio, sendis 18 mesaĝojn, Li bedaŭrinde havis gravan akcidenton kaj ni esprimas niajn resanigajn bondezirojn. En unu letero li faras interesan demandon pri la reeldono de la japana revuo TEMPO. Ni citas lin:

A.- "Certe estus interese legi en malnovaj revuoj, ĉu internaciaj, ĉu naciaj, kaj ankaŭ la ekzemplon, kiun mi aŭdis, estis tre interesa. Sed mi demandis min, kiu aĉetos tiun noveldonitan revuon? Ĉu ekzistas por tio ia "merkato". Ekzistas ja en Esperantujo jam tiom da revuoj, kiuj havas malfacilaĵojn rilate je la vendado. Certe, se ne gravas la financado, tiu projekto povas havi grandan valoron por dokumentado kaj ankaŭ por unuopaj legantoj. Sed, pardonu, se mi estas materialisto, kiu finansas ĝin? Ĉu ne pli valorus subteni la nun ekzistantajn literaturajn revuojn?"

CL.- Ni respondos, ke ja ekzistas merkato por tiuj reeldonitaj revu-kompletoj. Ĝenerale okupiĝas kaj finansas tiujn etkvantaj reeldonojn speciala komitato aŭ kooperativo, kiu ne celas profiton, sed kiu konscias, pri la dokumenta graveco de la koncerna reeldono. Malmultaj esperantologoj povas posedi kompletajn kolektojn de la historie gravaj revuoj, nur per reeldonoj ili povas riĉigi la propran bibliotekon per studcele signifaj periodaĵoj. Kaj eĉ multaj publikaj bibliotekoj, kiuj starigas esperanto-fakon, nur tiel povas meti je la dispono de siaj uzantoj la ĉefajn esperanto-revuojn jam de longe elĉerpitajn.

A.- Tiuj reeldonoj ne malhelpas aboni nun aperantajn revuojn. Tio ne estas sama afero.

CL.- Pri nia recenzo de la libreto "Zamenhofa Ekzemplaro" Johannes WINDISCH sin ankaŭ esprimis. Ni citas lin:

A.- "La hodiaŭa preparolo de la libro "Zamenhofa Ekzemplaro" estis kaj estas por ĉiuj esperantistoj, ĉu komencanto aŭ progresinto, tre interesa. Ne nur la enhavo de tiu ĉi libro estas informriĉa, sed ankaŭ la ekesto de la libro estis interesa. Certe kelkaj el viaj aŭskultantoj decidis aĉeti tiun libron."

CL.- Ni estas kontentaj ekscii, ke niaj recenzoj instigas je aĉetoj. Tio kuraĝigas nin atentigi niajn geaŭdantojn pri aĉetindaj libroj.

A.- Saluton al Marian ZDANKOWSKI en 0lsztyn, Pollando, al Sona ZEDNIKOVA en Modrany, Ĉeĥoslovakio, kiu ricevis de sia filo por kristnasko novan radiricevilon, por povi nin pli bone aŭskulti.

Cl.- Saluton al Bartocha ZENON en Rybnik, Pollando, al Frantisek ZMESKAL en Hradište-St. Mesto, Ĉeĥoslovakio, kaj al Henry ZYGOWSKI en Tuchola, Pollando.

A.- Kiel vi konstatas, ni alvenis je la litero Z. Tial ni fermas nian leterkeston, kiun jam nun ekinvadis novaj mesaĝoj, al kiuj ni respondos post kelkaj monatoj, kiam la kesto denove estos plena. A1 la sbribontoj ni petas interkrampe doni per esperantaj literoj la proksimuman prononcon de siaj nomoj kaj loĝloko laŭ la esperanta fonetiko kaj substreki la familian nomon. Tio multe helpos nin en nia responda laboro. Kaj ĉiu bonvolu tre legeble skribi siajn nomojn kaj adreson.

Cl.- Vi aŭdis elsedon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND diras al ĉiuj: Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*